La anĝeva grupo deziras al vi ĉiuj bonan novan jaron

ZAMENHOF-FESTO 2017

En Anĝevo, dimanĉon la 3-an de decembro 2017, okazis la tradicia Zamenhofa tago, organizita ĉijare de la grupo Esperanto-Angers. La tuta tago disvolviĝis en Esperanto en la salonoj de "Éthic-Étapes". Preskaŭ 60 homoj el 7 departementoj (37, 44, 53, 72, 74, 85, 49) partoprenis, akceptitaj de la organiza teamo per trinkaĵoj kaj frandaĵoj. Jeanik Marolleau, prezidanto de Esperanto-Angers, prezentis la programon de tiu festotago kies temo estis "bildstrio kaj bildrakonto".

Unue, Serge Sire, nia gasto, parolis pri sia daŭra sperto pri bildrakontoj. Poste, li sukcesis vigligi la tutan parto-prenantaron per amuzaj ludoj : li pro-ponis al ĉiuj malsamajn bildojn, el kiuj, kunigitaj duope aŭ triope, oni devis krei historion mallongan. Serge desegnis surtabule kaj eĉ moralaĵojn li trovis al niaj elpensaĵoj !

Matenfine, Jeanik Marolleau kaj liaj lernantoj de la konversacia kurso prezentis la laboron elektitan por ĉi jaro, ideo iomete "freneza" de nia amiko Frédéric Lauriol kiu proponis traduki bildrakonton nomitan *"Mortu L'Homo, Vivu L'Ozono"* (*"À Mort l'Homme, Vive l'Ozone"* en la franca), tamen 96-paĝlongan ! Ankaŭ niaj najbaroj esperantistaj kiuj akceptis partopreni en tiu aventuro venis dividi sian sperton.

Post la tagmanĝo, FaMo (Fabrice Morandeau) kantis por ni kelkajn eltiraĵojn de la nova KD *"Jacques Brel en Esperanto"* kiun li preparas kun sia bando *La Kompano*j por 2018. Ni poste kantis kun li kelkajn aliajn kanzonojn.

Sekve, intervenis Christian Rivière el Nantes por paroli pri la evoluo de sia sperto kiel tradukanto kaj pri sia laboro kiel aŭtoro.

Ankaŭ ĉeestis en la salono ekspozicio de pen-traĵoj faritaj de Pauline Gaborit kaj Serge Sire, kaj brokantado de malnovaj Esperantaj libroj el nia biblioteko.

Por fini nian feston, en la spirito de Zamenhof, Pauline Gaborit kaj Vito Markov invitis nin al vojaĝo. Ili parolis pri siaj travivaĵoj en Koreio dum la somero 2017, prezentante belajn fotojn.

Dankon al ĉiuj kiuj intervenis aŭ partoprenis.

La organiza teamo de Esperanto-Angers

Vi jam povas rezervi sabaton la 17-an de marto posttagmeze por la membrokunsido de Esperanto-Angers (AG 2018)… ...pliaj detaloj en la *Letero* de januaro.

ZAMENHOF-FESTO 2017

Dimanche 3 décembre 2017, à Angers, se déroula la traditionnelle "Zamenhofa tago" organisée cette année par le groupe Espéranto-Angers. L'ensemble de la journée se déroula en espéranto dans les salons de "Éthic-Étapes". Presque 60 personnes venues de 7 départements (37, 44, 53, 72, 74, 85, 49) y participèrent, accueillies avec boissons et friandises par l'équipe organisatrice. Jeanik Marolleau, président de Espéranto-Angers, présenta le programme de cette journée de fête dont le thème était "la bande dessinée".

Tout d'abord, notre invité, Serge Sire, parla de sa longue expérience de la bande dessinée. Puis, avec succès, il dynamisa tout le groupe avec des jeux amusants : il proposa à chacun des images différentes à partir desquelles, assemblées par deux ou trois, nous devions créer un récit. Serge dessina au tableau nos "trouvailles" et leur trouva même une morale !

En fin de matinée, Jeanik Marolleau et ses élèves du cours de conversation présentèrent le travail choisi pour cette année, une idée un peu "folle" proposée par notre ami Frédéric Lauriol : la traduction de *"À Mort l'Homme, Vive l'Ozone",* une bande dessinée de 96 pages ! Nos voisins espérantistes qui avaient accepté de participer à cette aventure vinrent aussi partager leur expérience.

Après le repas, FaMo (Fabrice Morandeau) chanta pour nous quelques extraits du nouveau CD *"Jacques Brel en esperanto"* qu'il sort en 2018 avec son groupe *La Kompanoj*. Puis, nous avons tous chanté avec lui quelques autres chansons.

Par la suite, est intervenu Christian Rivière de Nantes qui nous parla de l'évolution de son expérience de traducteur et de son travail d'auteur.

Également, dans le salon, se tenaient une exposition de tableaux réalisés par Pauline Gaborit et Serge Sire, et une brocante de livres anciens en espéranto provenant de notre bibliothèque.

Pour terminer notre fête dans l'esprit de Zamenhof, Pauline Gaborit et Vito Markov nous invitèrent au voyage. Ils nous parlèrent de leur expérience vécue en Corée pendant l'été 2017, en présentant de jolies photos.

Merci à tous les intervenants et participants.

L'équipe organisatrice d'Espéranto-Angers

Vous pouvez déjà réserver le samedi après-midi du 17 mars pour l'Assemblée Générale de Espéranto-Angers (AG 2018)… ...plus de détails dans la *Letero* de janvier

---